

# IpI 34 (3/00)

## Enhavo

1	Konferencoj pasintaj.....	2
1.1	Scienca kunsido omaøe al István Szerdahelyi en ELTE-Universitato Budapest (Iván Bujdosó) .....	2
1.2	10-a Kongreso de Hungara Aplika Lingvistiko en Székesfehérvár .....	2
1.3	Interlingvistiko kaj esperantologio en Tel-Avivo .....	3
1.3.1	Internacia kolokvo „forøi vivantan lingvon“ (Humphrey Tonkin) 3	
1.3.2	Esperantologia konferenco .....	6
2	Akademia simpozio pri lingva planado kaj leksikologio en Zagrebo, 2001 .....	7
3	Denove habilitiøo pri interlingvistiko: Alicja Sakaguchi.....	8
3.1	Karakterizo de la laboraáo (celo, laborkampo).....	9
3.2.	Propono utiligi rezultojn de la esplorkampo.....	10
3.3	Konciza resumo de la habilitiøaj ekspertizoj.....	11
3.4	Listo de publicaáoj.....	12

\*\*\*

*IpI informas pri interlingvistikaj aktivecoj kaj publicaáoj, inkluzive lingvo-politikaj. La redaktoro nur mencias materialojn, kiujn li ricevis en la originalo aý kiel kopion. La bulteno estas bibliografie orientita, tamen ankaý publikigas recenzojn, raportojn kaj aliajn materialojn.*

# 1 Konferencoj pasintaj

## 1.1 Scienca kunsido omae al István Szerdahelyi en ELTE-Universitato de Budapest

La 6-an de decembro, 1999, Katedro de Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko de ELTE okazigis scienca kunsidon je la memoro de István Szerdahelyi, kiu estus 75 jarojn aĝa.

Dum la kunsido oni prezentis jenajn prelegojn:

- *Máth,é Árpád*: La Esperanta gazetaro pri István Szerdahelyi post lia morto
- *Barcsay, Zsuzsa*: Personaj travivaĵoj pri István Szerdahelyi
- *Benczik, Vilmos*: Skrib(it)eco kaj beletro
- *Gados, László*: La klopodon de D-ro István Szerdahelyi pruvis la tempo
- *Farkasné, Tatár Éva*: Personaj konfesoj pri István Szerdahelyi
- *Wacha, Balázs*: La fontoj de lingvaj ŝanĝoj en Esperanto
- *Bujdosó, Iván*: Modernaj rimedoj en la servo de akiro de komunikada kompetento
- *MacGill, Stefan*: Lastatempaj vidbendoj kaj aliaj lerniloj
- *Varga-Haszonits Zsuzsa*: La lingvistika labor(ar)o de István Szerdahelyi
- *Horváth Katalin*: Modaleco en Esperanto
- *Rados Péter András*: Esperanto kaj ĝiaj rivaloj en la spegulo de la neologismoj (la esploroj de István Szerdahelyi)
- *Tötösné Gados Zsuzsa*: Raporto pri la stato de prilaboro de postlasaĵo de István Szerdahelyi

Ĝeestis inter aliaj la filo de Szerdahelyi (Balázs) kun sia edzino. Partoprenis averaĝe 24 personoj.

(Laŭ informo de Iván Bujdosó)

## 1.2 10-a Kongreso de Hungara Aplika Lingvistiko en Székesfehérvár

Inter la 18-a ĝis 20-a de aprilo 2000 en la hungara urbo Székesfehérvár okazis la 10-a

Kongreso de Hungara Aplikata Lingvistiko.

Partoprenis 338 personoj (laŭ la nomlisto), estis plenaj prelegoj, laborkunvenoj, rondtablaj interparoloj kaj en 13 sekcioj prelegoj.

Esperanto-rilataj prelegoj estis jenaj:

En la 7-a sekcio (kontrasta kaj aplika lingvistiko) *Varga-Haszonits Zsuzsa*:

Esperanto kaj interlingvistiko

En la 3-a sekcio (interkultura komunikado kaj lingvouzo en EU) *Smidéliusz Kálmánné (Katalin)*:  
Indiĝenaj dialogo sen lingvaj baroj

La resumo aperis, la volumo kun la prelegoj aperos.

(Laŭ informoj de Iván Bujdosó, Budapest, Szív u. 37. f. 2, HU-1063 Hungario)

### **1.3 Interlingvistiko kaj Esperantologio en Tel-Avivo**

En la kadro de la 85-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto en Tel-Avivo, okazis du aranĝoj, ligitaj al interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj.

#### **1.3.1 Internacia kolokvo “forøi vivantan lingvon”**

Humphrey Tonkin

La 31-an de julio, 2000, samtempe kun la 85-a Universala Kongreso de Esperanto, grupo de lingvistoj kolektiĝis ĉe la Universitato de Telavivo por partopreni internacian kolokvon, kiu komparis la socilingvistikajn radikojn de la moderna hebrea lingvo kaj de Esperanto -- du lingvoj, kiuj ekestis en proksimume la sama historia momento sub impulso de du fortaj personecoj el simila kultura fono, nome Ben-Yehuda kaj Zamenhof. En sia enkonduko al la temo, distribuita antaŭ la kolokvo, *Eldad Salzman* atentigis, ke, kvankam “la historioj kaj la nuna sociologia situacio de la du lingvoj estas tre malsamaj, tamen ajnas ekzisti ankaŭ similecoj, ekzemple (1) la entuziasmo per kiu pioniroj komence de la 20-a jarcento celis enkonduki la ‘novan’ lingvon en la

ĉiutagan vivon, kaj (2) la gramatika ekvilibro en la du lingvoj inter striktaj gramatikaj reguloj kaj relativa anarkio.”

La kolokvo, kiun aŭspiciis CED unuflanke kaj la lingvistika fakso de la universitato aliflanke, kunvenigis israelajn profesorojn, i.a. *Fred Landman* (lingvistiko, Univ. Tel Aviv), *Susan Rothstein* (angla lingvo, Univ. Bar Ilan), *Baruch Podolsky* (semida lingvistiko, Univ. Tel Aviv), *Elena Dubnova* (afrika lingvistiko, Hebrea Univ. Jerusalemo), *Vladimir Mesamed* (aziaj kaj afrikaj studoj, Hebrea Univ.), *Shlomo Izre'el* (hebrea kaj semidaj lingvoj, Univ. Tel Aviv), kaj israelajn studentojn. Flanke de CED, partoprenis i.a. *István Ertl* (Universala Esperanto-Asocio), *Geraldo Mattos* (Univ. Curitiba, Brazilo), *Mauro La Torre* (Univ. Roma 3, Italio), *Iván Bujdosó* (Univ. ELTE, Budapeŝto, Hungario), *Christer Kiselman* (Univ. Uppsala, Svedio), *Humphrey Tonkin* (Univ. Hartford, Usono) kaj pluraj aliaj.

En sia malferma prezento, *Prof. Tonkin* atentigis, ke Zamenhof, kreante sian lingvon fine de la 19-a jarcento, celis fari ion tute alian ol aliaj fondintoj de internaciaj movadoj en tiu epoko. La 19-a jarcento ja estis periodo de fondiĝo de pluraj internaciaj organizaĵoj, ekzemple por solvi la praktikajn problemojn de poŝto, telegrafio k.s., aŭ por interveni en la interrilatojn de la ŝtatoj, ekzemple la Ruĝa Kruco. Tamen, ĉiam temis pri kreo de federacioj de naciaj asocioj, instancoj, aŭ branĉoj. Zamenhof, aliflanke, eĉ kontraŭante la starigon de Esperanto-organizaĵoj, celis krei efektivan internacian kulturon, al kiu ĉiu unuopulo rilatu sen interveno de instancoj kaj organizaĵoj. Nenio simila ekzistis en tiu epoko. Zamenhof ja kreis bazon de lingvo, sed li rapide transdonis ĝin al ĉiaj uzantoj, kiuj do partoprenis ĉian evoluon kaj kontribuis al ĝi. Elektante leksikajn elementojn el jam ekzistantaj lingvoj, Zamenhof kreis tujan semantikan, kaj sekve kulturan, historion por la lingvo, kiun li plue fortigis per tradukado de grandaj literaturaj verkoj, enkondukado de proverboj el plej diversaj ekzistantaj lingvoj, kaj traduko de la tuta Malnova Testamento. Lia klopodo kunigi la plej altajn pensojn de la homaro en filozofion, kiu transpontu la homajn religiojn, en sia Hilelismo (poste Homaranismo) estis nenio alia ol plia celado al tutmonda paca komunumo. Tiu universalisma impulso, same kiel la insista klopodo krei funkciantan komunumon de parolantoj de la lingvo, havas siajn paralelojn en la novhebrea.

Prezentante siajn pensojn pri la temo, *profesoro Mattos* nomis ilin la pensoj de poeto pli ol tiuj de profesoro. Lingvo estas spirito de popolo, kaj revivigi lingvon estas miraklo, li asertis. Lingvoj kapablas regajni sian stabilecon post periodoj de malekvilibro, kiel montris klare la portugala – kiu siavice estas nenio alia ol evoluinta latina lingvo. Kiel, do, lingvoj forigas eventualan funkciajn deficitojn? Prof. Mattos pridiskutis en tiu rilato la skribsistemon de Esperanto kaj ankaŭ la manieron, laŭ kiu Esperanto forigas leksikajn deficitojn per kreo de neologismoj. Je unu ekstremo, Esperanto simple rekte pruntas el aliaj lingvoj; je alia ekstremo, ĝi uzas endogenajn, priskribajn tradukojn. En Esperanto la rolo de centraj instancoj en tiu leksika procedo (la Akademio de Esperanto, ekzemple) estas tre, eble tro, malforta. Ĉar la Esperanto-komunumo estas lingva, ne spaca, oni emas klopodi esprimi en ĝi ĉion esprimeblan en aliaj lingvoj, kvazaŭ temas pri ia projekto senbride manipulebla. Efektive, iuj konsideras Esperanton projekto (kaj do senfine tu-ebla), aliaj lingvon (kaj do blinde sekvenda). Lingvoj konsistas el strukturo kaj leksiko; ĉe Esperanto la unua estas (kaj estu) tre firma, dum la dua estas tre fleksa. Lingvoj ekzistas por informi kaj por plezurigi, kaj oni devas celi atingi ekvilibron inter la du bezonoj: necesas, ke komisionoj kaj lingvaj komitatoj ludu rolon en la decido.

*Dror Kamir*, studento ĉe la Telaviva Universitato, prezentis la situacion de la novhebrea lingvo. Li atentigis, ke li estas denaska parolanto de lingvo, kiu apenaŭ havis denaskajn parolantojn antaŭ cent jaroj: ĝi estis liturgia lingvo nur. Sed en tiu frua epoko, gepatroj insiste uzis la lingvon en la hejmo, tiel ke ĝi fariĝis hejma lingvo eĉ de gepatroj, kiuj havis saman propran denaskan lingvon, ekzemple la jidan. Motivigis ilin ĉefe ideologio. La infanoj siavice uzis la lingvon en la lernejoj kaj inter si, tiel ke ekestis perinfana cirkvito, kiu korektis kaj plialtigis la kvaliton de la hejma lingvouzo de la gepatroj. Kvankam hodiaŭ ekzistas pli da frazeologiaj limigoj en la novhebrea ol en la frua epoko, tamen la inventemo de infanoj ankoraŭ ludas sian rolon en la lingvoevoluo. En tiu senco, la novhebrea estis kaj iagrade restas lingvo de infanoj. Esperanto, tamen, ĉiujn estas esti unuavice lingvo de plenaĝuloj.

Prof. *Podolsky*, kiel parolanto de Esperanto kvankam esence ekster la Esperantomovado, listigis kelkajn paralelojn kaj kontrastojn inter Esperanto kaj la novhebrea:

1. Ambaŭ komencis sian vivon kiel unuavice skribataj lingvoj, kaj poste parolataj (do, la inverso de la kutima evoluo).
2. Ambaŭ estis motivitaj de ideologio. La unuaj esperantistoj estis plejparte homoj, kiuj scipovis lingvojn: ne estis tio, ke ili bezonis Esperanton, sed ke ili elektis ĝin. Same ĉe parolantoj de la novhebrea: granda plimulto de la fruaj setlantoj en la tiama Palestino parolis la jidan kaj konis du-tri pliajn lingvojn (iagrade, tiu sama multlingvismo ankoraŭ ekzistas en la nuna Israelo). Efektive, la germana preskaŭ venkis en la lingva konkurenco de la fruaj jaroj de la jarcento.
3. La novhebrea estas semida lingvo kun supraĵaj eŭropaj elementoj. Eŭropa influo klare manifestiĝas en la leksikaj elementoj, sed ne tiom en la strukturaj. Same, la plej eŭropa elemento de Esperanto estas la leksika.
4. Novaj terminoj eniras la novhebreaan parte per individuaj iniciatoj, parte per akademiaj. Kvankam kelkaj gramatikaj normoj eksmodiĝis en la novhebrea, tiuj -anoj iras tre malrapide, kaj oni ne povas devigi tiajn novigojn – same kiel en Esperanto.

Ne surprize, ke la ĉi-supraj rimarkoj de la diversaj parolantoj vekis foje tranĉajn, eĉ tradukistpaneajn malkonsentojn (oni uzis Esperanton kaj la anglan en la kolokvo). Ne ĉiuj konsentis, ke ideologio estis la sola, aŭ eĉ la ĉefa forto en la frua evoluo de la novhebrea; ne ĉiuj konsentis, ke la klasika hebrea estis tiel ekskluzive liturgia kaj neevoluinta; ne ĉiuj konsentis pri la semideco de la novhebrea. La aserto, ke la novhebrea lingvo estas lingvo de infanoj dum Esperanto estas lingvo de plenaĝuloj, produktis aparte viglajn inter-anojn, en kiu oni aparte emfazis la fenomenon de denaskaj parolantoj de Esperanto kaj ties lingvoakiron. Kelkaj partoprenantoj eĉ mem uzas Esperanton en la hejmo kaj edukas siajn infanojn en tiu lingvo, kaj do povis paroli el propra sperto. Oni konkludis, ke estus aparte interese fari komparon inter la iama lernado de la novhebrea fare de pioniraj infanoj kaj la hodiaŭa akiro de Esperanto fare de t.n. denaskaj esperantistoj.

La kolokvo finiĝis per peto al la partoprenantoj, flanke de prof. Tonkin, stimuli plian studadon ĝenerale de la rilatoj inter la du lingvoj, eventuale pere de la paĝoj de *Language Problems and Language Planning (LPLP)*, la revuo de CED, kaj per aparta danko al la partoprenintoj pro tre pensinstiga inter-anĉo de ideoj.

### 1.3.2 Esperantologia konferenco

La serio de esperantologiaj konferencoj startis en la kadro de la 63-a Universala Kongreso de Esperanto, 1978 en Varna /Bulgario (iniciatita de D. Blanke). Tiuj konferencoj fariøis plene tradiciaj kaj forte frekventataj dum la kongresoj. La 23-a okazis en Telavivo kaj traktis la rilaton inter preskriba kaj priskriba gramatiko en Esperanto.

La konferenco havis lokon por (nur) du prelegoj:

- Christer Kiselman: Priskribo kaj normigo de matematikaj terminoj
- Geraldo Mattos: Pri problemoj de la vortfarado en Esperanto

Prof. Kiselman (Svedio) æe la ekzemplo de matematikaj terminoj montris, ke malfacilas distingi inter preskribaj kaj priskribaj tendencoj en la sfero de terminologio.

Prof. Mattos (Brazilo) traktis la teorion pri vortfarado de Esperanto kaj klarigis, ke anstataý paroli pri morfologio de la vorto oni prefere parolu pri la sintakso de la vorto

## 2 Akademia simpozio pri lingva planado kaj leksikologio en Zagrebo, 2001

La Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj kaj la Akademio de Esperanto organizas kune internacian simpozion pri *lingva planado kaj leksikologio*, okazonta en Zagrebo, Kroatio, de la 28-a øis la 30-a de julio 2001. La laborlingvoj estos la *kroata, Eesperanto, la angla kaj la franca*.

La malferma ceremonio de la simpozio okazos en la posttagmezo de la 28-a de julio (sabate), kaj la simpozio finiøos en la posttagmezo de la 30-a de julio 2001 (lunde).

Renkontejoj: La palaco de la Kroata Akademio en Zagrebo.

Kontribuoj: Ni bonvenigas sciencajn kontribuojn al la simpozio. Sendu vian tekston en elektronika formo al profesoro Geraldo Mattos, <[mattos@super.com.br](mailto:mattos@super.com.br)>, antaý la

fino de novembro 2000. Escepte ni povas akcepti tekston en ne-elektronika formo, sed nur post antaŭa interkonsento kun profesoro Mattos kaj nur se ĝi alvenas al li ĉe

Rua Dr. João Motter, 98, BR-81210-260 Curitiba PR, Brazilo, antaŭ la fino de oktobro 2000. Akceptitaj artikoloj estos publikigitaj en volumo kiu estos preta antaŭ la simpozio.

Partoprenado: Personoj kiuj deziras partopreni en la simpozio (eĉ sen prezento de iu verko) estas petataj informi profesoron Christer Kiselman, <[kiselman@math.uu.se](mailto:kiselman@math.uu.se)>, antaŭ la fino de majo 2001. (Papera adreso: Poptkesto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedio.)

Organiza komitato: De la Kroata Akademio kaj de la Akademio de Esperanto: Ivo Padovan, Prezidanto, Geraldo Mattos, Prezidanto, Andrija Kaptelan, Ĝenerala sekretario, Christer Kiselman, Vicprezidanto, Dalibor Brozović, Direktoro de la Leksikografia Instituto, Renato Corsetti, Ĝenerala sekretario, Spomenka Ptimec.

### **3 Denove habilitiĝo pri interlingvistiko: Alicja Sakaguchi**

Maloftas habilitiĝoj pri interlingvistikaj temoj.

Eble i.a. pro tio, ĉar la t.n. habilitiĝo estas invento de meza Eŭropo. Temas pri tio, ke oni devas verki duan doktorigan disertacion kaj sukcesi apartan universitatan ekzamenan proceduron, kiu malsamas de lando kaj lando kaj de universitato al universitato.

La titoloj estas *Dr. habil.* kaj *Dr. sc.* (siatempo en GDR, Hungario k.a. aliaj landoj). Post tio oni ricevas aŭtomate (aŭ post certa provtempo) la universitatan instrurajton „*Venia legendi*“, aŭ „*Facultas docendi*“, kiu estas kondiĉo por fariĝi universitata docento aŭ profesoro. Se oni ne ricevas buĝetitajn postenojn (ekz. profesoro) oni ĝenerale estas „privata docento“. Tiu kutimo estas nekonata en Britio, Usono kaj aliaj landoj. Lastatempe en Germanio laŭtindas voĉoj, kiuj favoras la forigon de tiu bariero al junaĝaj profesoriĝoj. Tamen, la habilitiĝo montras certan akiritan nivelon en la scienca agado.



Post la habilitaĵoj de la redaktoro (per disertacio/libro pri planlingvoj, siatempe en GDR, Humboldt-Universitato, Berlino, 1985, reagnosko en 1995), sekvis, denove el iama GDR, *Sabine Fiedler* (per disertacio/libro traktanta la frazeologion de Esperanto, universitato Leipzig, februaro 1999, kp. Ipl 28/4., 30/4.), kaj en la sama jaro *Alicja Sakaguchi* el Mömbris- Brücken, æ Frankfurt/Main (novembro 1999).

Pi ofte gvidis interlingvistikajn seminariojn en la universitato de Frankfurt/Main kaj publikigis multajn studojn en lingvistikaj revuoj kaj antologioj, aparte en Germanio. D-rino Sakaguchi habilitaĵis per libro pri interlingvistiko, publikigita en Germanio (kp. Ipl 25/4.2) en Adam-Mickiewicz-Universitato Poznan/Pollando surbaze de ekspertizoj de tri pola profesoroj, (i.a. de *prof. d-ro Marian Jurkowski*, kiu i.a. verkis la libron „Od wie (y de języka kósmitów. Biażystok: Krajowa Agencja Wydawnicza, 1986, 156 p.)

(Red.)

D-rino habil. Alicja Sakaguchi sendis al la redaktoro la sekvajn materialojn:

### **3.1 Karakterizo de la laboraĵo (celo, laborkampo)**

#### En la Germana:

Die Untersuchung führt in die allgemeine Theorie der internationalen Plansprachen ein. Sie stellt den Versuch einer systematischen Gesamtdarstellung des sprachwissenschaftlichen Bereichs der Interlinguistik dar (vom lat. *interlingu(a)* + *istik*, d.h. Forschungsbereich, der sich mit Plansprachen und der in solchen Sprachen entstandenen Literatur beschäftigt). Die Betrachtungen dieses Buchs konzentrieren sich auf das Forschungsobjekt, Ziele, Aufgaben, Arbeitsgebiete, Forschungsmethoden, auf den gegenwärtigen Forschungsstand und auf Forschungsperspektiven der Interlinguistik. Breiten Raum nimmt dabei die Darstellung der Struktur, Funktion und Entwicklung von Plansprachen wie Esperanto, Ido, Volapük, Occidental-Interlingue, Interlingua und anderen ein. Die Arbeit enthält außerdem eine detaillierte Typologie der internationalen Plansprachen. Diese umfaßt auch die Beschreibung von deduktiv und induktiv geschaffenen Plansprachen, d.h. schematischer (z.B. Esperanto, Ido) und naturalistischer (z.B. Novial, Interlingua) Plansprachen. Die Beschreibungen von Plansprachen beinhalten zahlreiche Vergleiche mit natürlichen Sprachen.

### En Esperanto:

La laboraáo enkondukas al la øenerala teorio de internaciaj planlingvoj. Øi prezentas provon sisteme prezenti la lingvistikan laborkampon de interlingvistiko (laý la latina *interlingu(a) + istiko*, t.e. domeno de scienco okupiøanta pri planlingvoj kaj pri literaturo ekzistanta en tiaj lingvoj). La konsideroj koncentriøas al øia esploroobjekto, øiaj celoj, øiaj taskoj, øiaj metodoj, øia momenta esplorsituacio kaj øiaj evoluperspektivoj. Apartan lokon okupas prezento de strukturo, funkcio kaj evoluo de internaciaj planlingvoj kiel Esperanto, Ido, Volapük, Occidental-Interlingue, Interlingua kaj aliaj. La laboraáo enhavas krome detalan tipologion de planlingvoj konstruitaj dedukte kaj indukte, tio estas planlingvoj skemismaj (ekz. Esperanto, Ido) kaj planlingvoj naturalismaj (ekz. Novial, Interlingua). La priskriboj de planlingvoj estas akompanataj de multombraj komparoj kun naturaj lingvoj.

### En la angla:

The study is an introduction to a general theory of international planned languages. It is an attempt of systematic presentation of linguistic work in the field of interlinguistics (from the Latin *interlingu(a) - istics*, i.e. a domain of science dealing with planned languages and literature arising in those languages). Considerations in this book concentrate upon the subject, goals, tasks, areas of work, methods of research, current research situation and perspectives of development of interlinguistics. In particular, the work treats the structure, function and evolution of international planned languages, such as Esperanto, Ido, Volapük, Occidental-Interlingue, Interlingua etc. The work also contains a detailed typology of auxiliary planned languages. This includes the description of languages designed deductively and inductively, which are schematic languages (e.g. Esperanto, Ido) and naturalistic languages (e.g. Novial, Interlingua). The descriptions of planned languages are accompanied by several comparisons with those of natural languages.

## **3.2 Propono utiligi rezultojn de la esplorkomparoj**

### En la Germana:

Das Buch stellt die erste systematische, unterschiedliche Aspekte umfassende Einführung in die Theorie der internationalen Plansprachen dar. Es richtet sich nicht

nur an Linguisten und Studenten, sondern auch an Personen aus anderen Wissenschaftsbereichen, die an einer Gesamtdarstellung der Interlinguistik interessiert sind. Beobachtungen, die am Esperanto (als einem historisch-evolutionären Phänomen) und anhand anderer Plansprachen gemacht wurden, lassen sich nutzen

(a) zum Abbau der (im gegenwärtigen Linguistikbetrieb immer noch verbreiteten schädlichen, forschungshemmenden) Dogmen und Tabus (wofür hauptsächlich Informationsdefizite und falsche Assoziationen verantwortlich sind) und

(b) für die Verifizierung von allgemeinlinguistischen Theorien und Aussagen, die ausschließlich aus der Perspektive der natürlichen Sprachen aufgestellt wurden.

#### En Esperanto:

La libro estas la unua sistema, multaspekta enkonduko al la teorio de internaciaj planlingvoj. Ĝi direktiĝas ne nur al lingvosciencistoj kaj studentoj, sed ankaŭ al personoj el aliaj sciencbranĉoj interesitaj pri ĝenerala pritrakto de interlingvistiko. Observadoj faritaj surbaze de Esperanto (kiel histori-evolua fenomeno) kaj surbaze de aliaj planlingvoj devus kontribui al

(a) la refuto de (ankoraŭ ĉiam en fakaj rondoj disvastiĝintaj malutilaj, bremsantaj sciencajn esplorojn) dogmoj kaj tabuoj (baziĝantaj ĉefe sur informdeficitoj kaj eraraj asociigoj) kaj

(b) al la rekonsidero de ĝenerallingvistikaj teorioj kaj eldiroj starigitaj ekskluzive el la vidpunkto de la naturaj lingvoj.

#### En la Angla:

The book is the first systematic and wide-ranging introduction to the theory of international planned languages. It addresses not only linguists and students, but also persons from other sciences, who might be interested in any kind of interlinguistics. Observations on the basis of Esperanto (as a historical-evolutional phenomenon) and on the basis of other international planned languages should contribute to

(a) a refutation of dogmas and taboos - still prevalent in professional circles - harmful and detrimental to scientific research (mainly based on information deficits and wrong associations) and

(b) verification of general linguistic theories and statements established exclusively in terms of the natural languages.

### **3.3 Konciza resumo de la habilitiøaj ekspertizoj**

La recenzantoj konstatis, ke mem la temaro de mia laboraão koncerne esencajn karakteriztraĵojn de la internaciaj planlingvoj (de ilia strukturo, lingva normo, funkcio kaj evoluo), komparo de tiaj lingvoj kun la naturaj lingvoj samkiel la diskuto de la problemaro de la opozicio skemismo kaj naturalismo indas rekonon. Aliflanke la recenzantoj substrekas la gravecon de la konsideroj pri precizigo de la esplorobjekto de interlingvistiko, pri øia statuso kadre de lingvistiko, pri la problemaro de sciencoco de interlingvistiko kaj øia rilato al aliaj sciencbranæoj, øiaj konsistopartoj kaj øiaj esplormetodoj. La ekspertizantoj substrekas gravecon motivigi tezojn, kiuj estas esencaj por la kreado de øenerallingvistikaj teorioj, kiel ekz.

(a) ke same la lingvoj estiøintaj sinsekve de planado kiel lingvoj estiøintaj historie-spontane estas homaj lingvoj kaj apartenas al la objekto de lingvistiko,

(b) ke ne nur planlingvoj, sed ankaý naturaj lingvoj troviøas sub la influo de lingvoplanaj procedoj,

(c) ke internaciaj planlingvoj funkciantaj en praktiko (antaý æio Esperanto) troviøas sub la influo de diakronaj procesoj. La recenzantoj opinias, ke en la prezentita al ili laboraão estas konsideritaj æiuj esencaj problemoj de interlingvistiko - øia statuso, aspektoj lingvo-teoriaj, filozofiaj, sociaj, esplormetodoj kaj metodoj konstrui internaciajn lingvojn kaj krome celoj, taskoj kaj perspektivoj de la disciplino.

### **3.4 Listo de la publicaøoj**

1.) (1980): *Zu sprachwissenschaftlichen und pädagogischen Aspekten des Sprachorientierungsunterrichts*. (Arbeitsbericht). En: Paderborner Arbeitspapiere Nr. 60,

Paderborn: FEOll 1980.

2.) (1981): Trarigardo de arkaismoj baze de la 4-lingva konversaciaro de Heydn-Sylvester (1527) kun aparta konsidero rilate esperantigon de arkaikaj tekstoj. (Archaismusanalyse auf der Grundlage des 4-sprachigen Konversationswörterbuchs von Heydn-Sylvester (1527) mit spezieller Berücksichtigung der Esperanto-Übersetzung archaischer Texte.) En: Frank, H./Yashovardhan k.a. (Eld.): *Kibernetiko de la Homa Lingvo*. Budapest, Paderborn: Hungara Esperanto-Asocio 1981, p. 96-102. (Publikigita en: Frank, H./Yashovardhan k.a. (Eld.): *Lingvokibernetiko/Sprachkybernetik*. Tübingen: Narr 1992, p. 96-102.)

3.) (1981): *Interlingvistikaj Kontribuaĵoj. Protokolo de la 1-a Interlingvistika Kolokvo Paderborn 1981*. (Redaktado). Paderborn: Esperanto-Centro 1981.

4.) (1983): Formen der Sprachplanung mit besonderer Berücksichtigung interlinguistischer Methoden. En: Jongen, R./Knop, S. de/Quix, M.-P. (Eld.): *Mehrsprachigkeit und Gesellschaft. Akten des 17. Linguistischen Kolloquiums Brüssel 1982*. Vol. 2. Tübingen: Niemeyer 1983, p. 142-156.

5.) (1983): Plansprachen zwischen Spontaneität und Standardisierung. Semiotik und Interlinguistik. En: *Zeitschrift für Semiotik* 5/4 (1983), p. 142-156.

6.) (1983): Zur Typologie der interlinguistischen Systeme. En: Petöfi, J. S. (Eld.): *Texte und Sachverhalte*. Hamburg: Buske 1983, p. 253-283.

7.) (1984): Sprachwissenschaft und Interlinguistik. Einige Bemerkungen zum Humboldt'schen Doppelbegriff von "Ergon" und "Energeia". En: Krenn, H./Niemeyer, J./Eberhardt, U. (Hrsg.): *Sprache und Gesellschaft. Akten des 18. Linguistischen Kolloquiums Linz 1983*. Vol. 2. Tübingen: Niemeyer 1984, p. 226-237.

8.) (1984): Interlinguistics - a stepchild of linguistics? Development, subjects, goals, methods. In: Haese, J. den/Nivette, J. (eds.): *AILA Brussels 1984, Proceedings*. Vol. 1, p. 252-253.

9.) (1985): Interlinguistik - ein Stiefkind der Sprachwissenschaft? Entwicklung,

Objekte, Ziele, Methoden - eine Übersicht. En: Kürschner, W./Vogt, R. (Ed.): *Sprachtheorie, Pragmatik, Interdisziplinäres. Akten des 19. Linguistischen Kolloquiums Vechta 1984*. Vol. 2. Tübingen: Niemeyer 1985, p. 47-56.

10.) (1985): Was ist Interlinguistik? Eine begriffliche Analyse. En: *Wirkendes Wort* 4 (1985), p. 238-245.

11.) (1986): Ido-Konferenz. [Konferenraporto]. En: *Zeitschrift für Semiotik* VIII (1986) 1-2, p. 156.

12.) (1986): Sociological aspects of international constructed languages. En: *Sociological Abstracts of XIth World Congress of Sociology New Delhi 1986*, p. 130.

13.) (1986): Grucza, Franciszek: Zagadnienia metalingwistyki. Lingwistyka - jej przedmiot, lingwistyka stosowana. (Fragen der Metalinguistik. Linguistik - ihr Gegenstand, angewandte Linguistik.) Warszawa 1983. [Recenzo]. En: *Papiere zur Linguistik*, Nr. 34 (1986) 1, p. 71-72.

14.) (1987): Internationale geplante Sprachen. (Darstellung eines Forschungsprojekts/prezento de [habilitga] esplorprojekto). En: *Frankfurter Linguistische Forschungen*, Nr. 2 (1987), p. 36-39.

15.) (1987): Blanke Detlev: Internationale Plansprachen. Eine Einführung. Berlin 1985. [Recenzo]. En: *Kodikas/Code. Ars Semeiotica* 10 (1987) 1-2, p. 186-189.

16.) (1987): Welthilfssprache. En: Ammon, U./Dittmar, N./Mattheier, K.-J. (Ed.): *Sociolinguistics. An international handbook of the science of language and society*. Vol. 1. Berlin, New York: de Gruyter 1987-1988, p. 365-370.

17.) (1988): [Raporto pri simpozio]. Wissenschaftliches Symposium "100 Jahre Esperanto" Wien 1987. En: *Zeitschrift für Semiotik* 10 (1988) 1-2, S. 163-164.

18.) (1989): Towards a clarification of the function and status of international planned languages. En: Ammon, U. (ed.): *Status and function of languages and language*

*varieties*. Berlin, New York: de Gruyter 1989, p. 399-440.

19.) (komune kun Heribert Rück) (1989): Rasmus Kristian Rasks Konzeption einer Welthilfssprache. En: *Historiographia Linguistica* XVI (1989) 3, p. 311-326.

20.) (1989): International planned languages: an essay on their definition and limitation. In: Prewitt, T. (ed.): *Semiotics 1988. Proceedings of the Thirteenth Annual Meeting of the Semiotic Society of America 1988*. Cincinnati, Lanham, New York, London: University Press of America, p. 544-550.

21.) (1991): Zum Gegenstand der Interlinguistik. En: Bahner, W./Schildt, J./Viehweger, D. (eds.): *Proceedings of the Fourteenth International Congress of Linguists Berlin 1987*. Berlin: Akademie-Verlag 1991, p. 1651-1657.

22.) (1992): Der Weg von einem Sprachprojekt zu einer lebenden Welthilfssprache. Einige Aspekte des Statuswandels dargestellt am Beispiel des Esperanto. En: Ammon, U./Hellinger, M. (eds.): *Status change of languages*. Vol. 1. Berlin, New York: de Gruyter, p. 496-520.

23.) (1993): Pragmatische Aspekte der Interlinguistik. En: Stachowiak, H. (Hrsg.): *Pragmatik. Handbuch des pragmatischen Denkens. Vol. 4: Pragmatische Philosophie, Sprachpragmatik und formative Pragmatik*. Hamburg: Meiner 1993, p. 188-217.

24.) (1993): Esperanto - eine lebende Sprache. En: *Das Kommunikations- und Sprachenproblem in der Europäischen Gemeinschaft - Inwieweit könnte eine Plansprache zu seiner Lösung beitragen?* Konferenzakten Brüssel 29.09.1993. Brüssel: Europäisches Parlament 1993, p. 111-116. (vere eldonis : Hanns-Seidel-Stiftung- Red.)

25.) [1995] (1996): Zum Begriff der Kompetenz in einer Plansprache: Esperanto. En: *Mitteilungen aus dem Institut für Sprachwissenschaft der Universität Innsbruck. Misin-Report 7: Beiträge zur Interlinguistik*. Innsbruck 1995, S. 1-29. Ankaŭ en: Rist,

Thomas (Eld.): *Sprache, Sprachen und Kulturen. Entdecken, erforschen, lernen, lehren*. Thematische Festschrift zum 65. Geburtstag von Heribert Rück. Landau: Knecht 1996, p. 425-445.

26.) (1996 a): Rasmus Kristian Rask *Traktatu d' un Lingua ĩ universale (Abhandlung über eine allgemeine Sprache/Traktato pri ĝenerala lingvo)*. Teil II aus der Handschrift "Optegnelser til en Pasigraphie" (1823). Aus dem Nachlaß herausgegeben und kommentiert von Alicja Sakaguchi. Frankfurt am Main, Berlin, Bern etc.: Lang 1996 (190 p.).

27.) (1996 b): Die Dichotomie künstlich vs. natürlich und das historische Phänomen einer funktionierenden Plansprache. En: *Language Problems & Language Planning*, 20 (1996) 1, p. 18-38.

28.) [1996 c] (1997): Tempusmarkierung in Esperanto, Volapük, Lingua ĩ universale und in Occidental-Interlingue. En: Eichner, H./Ernst, P./Katsikas, S. (Hrsg.): *Sprachnormung und Sprachplanung. Festschrift zum 70. Geburtstag für Prof. Dr. Otto Back. Mit Beiträgen aus den Bereichen Graphematik, Orthographie, Namenkunde, Österreichisches Deutsch, Sprachnormung und Plansprachenkunde*. Wien: Praesens 1996, p. 331-345. (2-a plibonigita eldono) 1997.

29.) (1996 d): Marian Susskin (alias Andrzej Susski): Paninterlingwa. Powszechny język międzynarodowy. [Eine Panlinterlingua. Die internationale Gemeinsprache.] Warszawa: Państwowe Wydawnictwo Naukowe 1990. [Recenzo] En: *Language Problems & Language Planning* 20 (1996) 2, p. 187-190.

30.) (1996 e): Rasmus Rasks "Lingua ĩ universale" aus der Sicht der morphologischen Natürlichkeitstheorie. En: Sroka, K. A. (Eld.): *Kognitive Aspekte der Sprache*. Akten des 30. Linguistischen Kolloquiums, Gdansk 1995. Tübingen: Niemeyer 1996, p. 213-222.

31.) (1997): Zur Ideengeschichte der morphologischen Natürlichkeitstheorie aus interlinguistischer Sicht. En: *Zeitschrift für Sprachtypologie und*



*Universalienforschung* 50 (1997) 4, p. 296-307.

32.) (1998): *Interlinguistik: Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden.* (= Duisburger Arbeiten zur Sprach- und Kulturwissenschaft Bd. 36). Frankfurt am Main, Berlin, Bern etc.: Lang 1998 (492 p.).

33.) (komune kun Przemysław Jackowski, Dorota Misiek-Jackowska, Karol Koczy, Magdalena Lisiecka-Czop) (1999): *Ein deutsch-polnisches Glossar zum Lehrbuch "Wirtschaftsdeutsch von A-Z". Słowniczek niemiecko-polski do podręcznika "Wirtschaftsdeutsch von A-Z".* Hrsg.: Feuchert, S., Lipczuk, R. Szczecin: Wydawnictwo Promocyjne 1999 (47 S.).

34.) (presata): Tworzenie międzynarodowych języków pomocniczych na tle rozwoju językoznawstwa ogólnego. (Wykład habilitacyjny). In: *Scripta Neo-philologica Posnaniensia*, tom II: Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu. (S. 26.).

35.) (preparata): Projekt języka ogólnowiatowego ("Lingua í universale") Rasmusa Kristiana Raska. Wydawnictwo Uniwersytetu w Białymstoku.

36.) (preparata): Dychotomia "sztuczny" i "naturalny" z perspektywy języka międzynarodowego esperanto. In: *Studia Linguistica Posnaniensia*: Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu.

Adreso: Dr. habil. Alicja Sakaguchi, Am Kreuzberg 5, D-63776 Mömbris-Brücken,

Tel./Fax: 06029-6186., [sakaguchinet@aol.com](mailto:sakaguchinet@aol.com)

---

**Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) æe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Red.: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.: ++ 49-30-54 12 633, fakso: ++ 49-30-54 56 742.**

**< [blanke.gil@snafu.de](mailto:blanke.gil@snafu.de) > Mendojn oni direktu nur al UEA, kontribuojn nur al la redaktoro, se eble per retpoŝto aŭ sur diskedo. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco**

**estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Estas bibliografiitaj nur posedataj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro.**

---